

Doris Wildgrube,  
Sankta vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Venas je la jaro-fino  
Sankta de l' Vesper' trankvil',  
regas jen en ĉiuj ĉambroj  
de multnombraj lumoj bril'.

Multaj bonaj aĵoj kuŝas  
sur la dono-tabloj por  
la infanoj, sed enestas  
veo-sent' en mia kor'.

Multaj homoj sur la Tero  
havas zorgojn tiom da;  
milionoj da infanoj  
ne ricevas donojn ja.

Ho Sinjor', finfine lasu  
regi pacon sur la Ter':  
ĉar por ni nur tiam estos  
vere Sankta la Vesper'.

*Traduko de la Germana poemo "Heiligabend"  
de Doris Wildgrube en Esperanton de MAN-  
FRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2007-11-  
07.*

*MR-463-1 / Arg-809-1623 (2013-02-01  
10:02:28)*

Doris Wildgrube,  
Heiligabend

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Doris Wildgrube.*

*Arg-809-1622 (2013-02-01 10:16:08)*

*Siehe auch: [http://www.vogtlandmundart.de/doris\\_wildgrube.php](http://www.vogtlandmundart.de/doris_wildgrube.php) und <http://www.vogtlandmundart.de/kontakt.php>. Die Anschrift der Verfasserin ist: Doris Wildgrube, Dorfstraße 49, D-08261 Schöneck, Tel. 037464/88895.*